

Ni aŭskultu Denis de Rougemont, 6-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 765, 1978.06.08 & 10

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La svisa verkisto Denis de Rougemont en sia verko "L'Avenir est notre affaire" (Ehstonteco estas nia afero) esprimas la opinion, ke Eŭropo troviĝas antaŭ decidiga alternativo. Per esperantigitaj citaĵoj ni resume prezentos tiun ĉi al vi.

A.- "Hodiaŭ forŝovante ĉiujn malnovajn debatojn flanken - estas la totalismo kaj estas la federismo. Minaco kaj espero. Totalismo simplas kaj rigidas kiel milito kaj morto. Federismo kompleksas kaj flekseblas kiel paco kaj vivo. Tiu ĉi antitezo regas nian jarcenton. Ĝi estas ĝia vera dramo. Ĉiuj aliaj paliĝas antaŭ ĝi, aperas kiel duarangaj aŭ trompaj, aŭ en plej favora kazo, kiel subordigitaj al ĝi." (p. 358).

C1.- Denis de Rougemont opinias, ke "ni povas antaŭvidi egalŝance militon kaj pacon." (p. 128-129). Sed li ne povas kredi, ke la eŭropanoj sin lasos gliti en totalisman diktaturon. "La hipotezo, kiu ŝajnas (al li) hodiaŭ plej certa estas, ke se Historio daŭras, ni travivos la supreniron de federigitaj Regionoj en Eŭropo, kaj poste en la Mondo, kaj la dekadencan de la naciŝtata organizo." (p. 350).

A.- Denis de Rougemont "estas devigata konstati, ke la naciŝtata kulto estas la sola religio en la 20-a jarcento, kiu ankoraŭ posedas punrajton, kaj kiu ĝin utiligas. Oni ne bruligas plu kristanajn herezulojn, sed oni mortpafas aŭ pendigas tiujn, kiujn oni akuzas je devojiĝo rilate al la naciŝtata kredo." (p. 336).

C1.- Tamen Denis de Rougemont ne povas kredi, ke la homoj restos adeptoj de la naciŝtata religio, kiu pli kaj pli evidente povas nur konduki la homaron al katastrofo. "Krom se okazos ekologia aŭ nuklea kataklismo, la politiko de la venonta jarcento havos personecajn kaj komunumajn celadojn." (p. 205). "La plej lasta celo de la Civito aŭ homa societo organizita - almenaŭ tia, kia okcidentano povas ĝin hodiaŭ koncepti - estos favori en ĉiu la plenan disvolviĝon de la personeco... Ĉicele aranĝiĝos ĉio en la Civito - edukado, leĝoj kaj moralo - profite al la sole aŭtenta progreso, kiu estas la homa progreso mem, ne la altiĝo de la nombro de la aĵoj nin ĉirkaŭantaj. Pli simple dirite: la persono estas la celo de la socio kaj ne la vendo de aŭtomobiloj, kiel povus kredi enketanto alteriĝinta inter ni el la fundo de l' spaco." (p. 215)

A.- Denis de Rougemont celas instituciojn, kies funkcio estos orientadi - kaj ne subpremi kaj kondiĉi - kiel faras la napoleoneca naciŝtata skolo. (p. 215) "Favorigo, orientado, promociado, tiuj ĉi nocioj kontraŭstaras al trudado, devigo, malpermeso; kiuj difinas la naciŝtatan registilon." (p. 215).

Cl.- "La sola vere grava politika problemo de la moderna socio ne estas elekti inter dekstro kaj maldekstro, kiuj fakte praktikas la saman religion, sed malkonstrui kaj superi la Naciŝtaton. Malfari la Naciŝtaton... jen la sola krea herezo de la 20-a jarcento." (p. 336).

A.- Por Denis de Rougemont tiu malkonstruo de la Naciŝtato efektiviĝos tra la iom-post-ioma vigligo aŭ revigligo de aŭtonomaj Regionoj. Por li "vera Eŭropa Federacio" estos "aro da Regionoj kaj ne de Ŝtatoj" (p. 325). "Vera Federacio ne fondiĝas sur la bazo de aliancitaj Ŝtatoj, sed sur la bazo de antaŭaj grupoj serĉantaj garantion por siaj liberecoj." (p. 325).

C1.- Jen kiel Denis de Rougemont priskribas tiun ĉi disvolviĝon al Eŭropo, kiu estus vera federacio: "Se ni volas Eŭropon - kaj ni povos ĝin havi - tio estas facile atingebla en niaj urbetoj kaj vilaĝoj kaj en la komunumoj kvartaloj; tie establiĝu la rimedoj por konstrui Eŭropon kaj ili estas simplaj: la rajto de komunumo aliĝi al regionaj sindikatoj mem elektitaj, ĉu temas pri loĝĉirkaŭaĵo, energio, transportrimedoj aŭ edukado, kaj la rajto al aŭtonoma buĝeto, kiun ĉefe nutradas la regionaj monrimedoj." (p. 355).

A.- "La tagon kiam la reto de la rilatoj starigitaj inter la Regionoj fariĝos pli firma ol la tradiciaj juraj ligoj pluekzistantaj inter ĉiu Regiono kaj ties nacia ĉefurbo - tiam eŭropa Revolucio estos latente plenumita." (p. 354)

Cl.- "Por transpasi la lastan etapon al kontinenta Federacio sufiĉos sendube elekti veran eŭropan Parlamenton kaj luktadi por ĝiaj kompetentecoj: ke ili estu fortikaj, kiam temos ordigi taskojn eŭrop-dimensiajn - sed nur por tio - la Regionoj kaj ties federacioj restantaj aŭtonomaj por ĉiuj taskoj regiondimensiaj." (p. 354)

A.- "La ĉefa celo de Regiono, kontraŭe al tiu de Naciŝtato, ne estas reliefigi la propran potencon, sed servi la liberecojn; ne estas montri sin pli forta ol najbaro per armiloj aŭ riĉaĵoj, sed resti la propra mastrumanto kaj memadministri sin propradezire, kaj ne kiel antaŭvidis ĉefurbaj oficejoj. (p. 315)

C1.- «La Regionoj, lastanalize, esprimas volon memadministran de la homo luktanta kontraŭ la freneziĝo ŝtat-adorema, freneziĝo civila aŭ soldata, diktatoreca aŭ demokrateca. (p. 305) »

A.- « La memadministrado unue estos la arto instigi la homojn okupiĝi pri tio, kio ilin koncernas. Ĝi alvokos baldaŭ la arton rediskuti la decidojn, kiuj ilin koncernas, kaj kiuj estis prenitaj sen ili. » (p. 306).

Cl.- Per tiuj ĉi citaĵoj ni provis prezenti la estontecon por Eŭropo, kiun antaŭvidas Denis de Rougemont. "L'Avenir est notre affaire" (Estonteco estas nia afero) per sia titolo bone montras, ke tiu ĉi konstruo de Federacia Eŭropo, bazita sur aŭtonomaj Regionoj dependos de ni ĉiuj. Kiel li skribis "La dekadenco de socio komenciĝas, kiam la homo sin demandas : « Kio okazos ? » anstataŭ sin demandi : « Kion mi povas fari ? » (p. 368). Denis de Rougemont en sia libro konstante montras al ni, ke multon ni povas fari. Konklude al nia hodiaŭa prelego rilate tiun ĉi temon, jen ankoraŭ du pripensigaj citaĵoj :

A.- « La katastrofoj instruos nenion al tiuj, kiuj ne vidis, kien iri, kaj do kiuj ne serĉas la vojojn kaj ilin neniam inventos. Neniam favoras vento por tiu, kiu ne scias, kien iri. Sed por tiu, kiu tion scias, ĉio eblas, kiam blovas vento, eĉ vento kontraŭa." (p. 364)

Cl.- "Ĉiu krea penso... prenas la proprajn dezirojn por realecoj, ĝis kiam tiuj ĉi deziroj kreas tiujn ĉi realaĵojn kaj donas al ili vivon en nia vivo, ilin realigas. Deziri la plejbonon en ni kaj per la forto de la deziro ĝian fariĝon, estas anticipi nian estontecon, pli bone : estas ĝin konstrui. » (p. 368)

A.- Venontan semajnon en lasta prelego pri la libro "L'Avenir est notre Affaire" (Estonteco estas nia afero) de Denis de Rougemont, ni pli detale priskribos, kion la verkisto vidas sub la termino Regionoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!